

Friedrich Schiller,

## Espero

*tradukita de Vasilij Devjatnin*

Tre multe homar' kun espero en koro  
 Pri vivo estonta parolas,  
 Kaj ĉiam al celo feliĉa kaj ora  
 Aliri plej baldaŭ ĝi volas.  
 Jen mondo ekvelkas, jen ree disfloras, –  
 Sed homo esperon senĉese adoras.

Espero kun li sen-aparte vivadas;  
 Ĝi knabon dorlotas, junulon  
 Per sorĉa radio ĝi gaje logadas,  
 Konsolas ĉe tomb' maljunulon :  
 Li tre lacigita per vojo de tero,  
 Foriras en tombon kun dolĉa espero.

Ho, ne! ĝi ne estas elpenso malvera,  
 Per revoj malsaĝaj naskita!  
 Ni scias, ni sentas kun kredo sincera,  
 Ke estos esper' plenumita.  
 Kaj tiu ĉi sento ĉu estas kapabla  
 Nin trompi en nia revaĵo agrabla?

*Traduko de la Germana poemo "Hoffnung" de FRIEDRICH SCHILLER (Frederiko Ŝilero, \*1759 – †1805) en Esperanton de VASILIJ DEVJATNIN (\*1862 – †1938).*

*Arg-1015-2056 (2014-05-20 12:14:13)*

*Pri la tradukinto vidu la vikipediejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij\\_Devjatnin](http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij_Devjatnin). La poem-esperantigo troviĝas en <http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php>.*